531.71.081 : 535.338.333 : 546.49.02

II.

Jam antaŭlonge oni proponis uzi la naturan frekvencon de vibrado de atomoj de kadmio (nome la ondolongon de iu linio en la spektro de kadmio) kiel normon de longeco, sed eĉ tia normo montriĝis ne pleje perfekta pro tio, ke, estante miksaĵo de diversaj izotopoj, la natura metalo ne provizas tute purajn, unufrekvencajn liniojn. La plej lasta antaŭenpaŝo en ĉi tiu kampo estas la propono utiligi, anstataŭ natura kadmio, artefaritan hidrargon, da kio Usono posedas jam du gramojn, de atommaso 198, faritan el oro en atomreakciilo. En tia strange renversita senco realiĝas la revoj de la alkemiistoj. K. F.

413.164:{621.3 + 537/8}

## INTERNACIA ELEKTROTEKNIKA VORTARO.

Laŭ decido de la Jarkunveno de ISAE en Bournemouth nia provizora vic-prezidanto, S-ro E. D. Durrant, okupas sin pri la esplorado de la situacio rilate al la nove projektita internacia vortaro plurlingva de la Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC). La Brita Esperanta Scienca Asocio jam starigis sekcion por okupi sin pri la afero laŭbezone, kiel provizoran paŝon por protekti la interesojn de ISAE, kaj oni estas urĝe petata informi al S-ro E. D. Durrant, 15 Beaufort Road, Reigate, Surrey, Anglujo, pri ĉiaj paŝoj kaj kontaktoj faritaj en aliaj landoj, por ke la agado povu esti alcentrigata.

La unua stadio de la koncerna laboro estos kompilado de anglaj kaj francaj vortlistoj kun difinoj. Tio postulos kvar ĝis kvin jarojn da laboro de la koncernaj naciaj komitatoj normigaj, kaj ĝis la finpreparo de tiu laboro ne estos demando pri preparo de vortlistoj en aliaj lingvoj. Sekve, por la vortara laboro ne estas urĝo, sed intertempe niaj anoj klopodu kontaktiĝi kun siaj naciaj komitatoj por elektroteknika vortara normigo por informi ilin pri Esperanto.

S-ro Durrant raportas, ke el liaj rilatoj kun la Brita Instituto por Normigo kaj kun aliaj montriĝas, ke estas iom da konfuzo pri la decidoj faritaj rilate Esperanton dum la Stresa Konferenco de Elektroteknikistoj. Li nun esploras por eltrovi la veron pri tiu afero, kaj raportos pri tio poste.

---

Noto de la Redaktoro: — Oni vidu ankaŭ la artikolon pri ĉi tiu temo en *Heroldo de Esperanto*, N-ro 1114, de 1-11-1949, paĝo 2a, 2a kolumno.

La Centra Oficejo de la IEC havas sian sidejon ĉe 39 Route de Malagnou, Genève, Svisujo.